


Numero: 330.
Novembro 2019.

27-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefona: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

La silento

Ekzistas diversaj silentoj. La plej doloriga silento estas tio, kiam en nia koro ĉio mutiĝas kaj en via kapo zigzagas bagatelaj pensoj.

La silento ofte trankviligas la homon, sed la troa frenezigas.

Mi ne ŝatas la laŭtan bruon. Ĝi murdas la seriozajn pensojn. Tiam mi kaŝiĝas en mia ĉambro kaj izolas miajn orelojn.

Oni diras, al la vivo apartenas la bruo kaj ni, homoj parolas de tago al tago pli laŭte. Tiuj laŭtaj paroloj estas sen enhavo kaj oni parolas kaj parolas laŭte, ĉar oni ne ŝatas la silenton.

Laŭ mi la silento estas bona kaj utila.

Mi proponas al ĉiuj, kiuj timas de la silento, nur unufoje fondiĝu en ĝi kaj fermu la okulojn. Mi grantias, antaŭ la animaj okuloj ekaperos belega, nova mondo. La silento inspiras grandiozajn pensojn kaj ĝi flugigas vin al la mondo de fantazio.

Eble nun miaj legantoj miras legante tiujn ĉi frazojn, kaj eble estas kiuj pensas, mi stultiĝis.

Ne, mi nur ŝatas la silenton, ĉar ĝi trankviligas min kaj ĝi donas al mi rifuĝejon de antaŭ la laŭta, brua mondo.

Tamen mi ne deziras, ke ĉio mutiĝu. Oni bezonas la silentan parolon. Ja, kiel preparoli niajn ĉiutagajn aferojn.

Mi estas nur kontraŭ la stultaj kriegadoj, senenhavaj diskutoj, kiuj preskaŭ ĉiutage venenigas nian vivon.

Ni serĉu la mezan vojon inter la silento kaj la tro laŭta bruego.

Mi kredas, ekzistas meza vojo, kiu kondukas nin al pli bona kaj pli bela mondo.

— Redaktanto —



La lingvogeniulo

La knabo jam sciis tri fremdajn lingvojn kvarjare. Li fulmrapide povis lerni la lingvojn.

Lia patrino estis tre fiera je sia fileto. Ŝi diradis al ĉiuj konatuloj kaj geamikoj:

— Peĉjo jam scias tri fremdajn lingvojn, kvankam li estas nur kvarjara. Ĝis li fariĝos dudekjara, parolos almenaŭ kvindek lingvojn. Li estas vera lingvogeniulo.

La homoj admiris lian eksterordinaran talenton. Estis, kiuj enviis lin.

— Eble li parolas neniun fremdan lingvon — diris la enviantoj. — Kiu aŭdis lin krom la patrino. Certe li scias eĉ ne sian gepatran lingvon.

Dum la jaroj la knabeto ankoraŭ ellernis du — tri lingvojn.

Lia famo rapide disvastiĝis en la urbo kaj en la tuta lando.

Kuracistoj, sciencistoj elvenis por ekzameni lin.

Oni ne volis kredi tiun ĉi eksterordinaran kapablon. Li fariĝis vera lingvogeniulo. Sufiĉis kelkaj semajnoj aŭ monatoj kaj li perfekte alproprigis la lernitan, fremdan lingvon.

Vane oni ekzamenis la knabon, ne estis trovita la kaŭzo de tiu ĉi mistera lingvokapablo.

Kiam li fariĝis dudekjara, li jam sciis pli ol kvindek lingvojn, sed ankoraŭ li deziris lerni ankaŭ aliajn,

Li ellernis diversajn lingvojn, eĉ ankaŭ iliajn dialektojn. Ofte li pli perfekte parolis ilin ol la denaskaj homoj, kiuj suĉis la lingvoscion kun la patrinolakto.

La lingvogeniulo estis dudek kvin jara, kiam li ekkonis Esperanton.

Tute hazarde li renkontis ĝin. Li ekvidis libreton kaj ĝi tuj vekis lian atenton.

Ĝis li alvenis hejmen li ellernis ĝin. Li estis ege feliĉa enpaŝante la domon kaj gaje diris:

— Mi trovis la plej bonan lingvon de la mondo. En la estonto mi ne lernos plu aliajn, fremdajn lingvojn.

— Ŝaŝa —



Pomorikolto

La somero estis varmega kaj nur malofte pluvis. Tiu ĉi vetero estis bona por la feriantoj, sed la agrikulturo suferis pro tio. Tial la pomoj ne povis dikiĝi kaj sur ĉiuj pomarboj estis tre, tre malgrandaj fruktoj.

La maljunulo ne ĝojis pro tio, eĉ li estis trista. En la pasintaj jaroj ĉiam liaj pomoj estis la plej belaj kaj la plej grandaj.

En la foiro oni tuj aĉetis ilin kaj por la pomoj li ricevis multe da mono.



Sed nun, ĉi jare la pomorikolto estis tre malriĉa.

Onidire tion ĉi kaŭzis la tuttera varmiĝo. Post jarcentoj la terглоbo pereigis kaj ĉio forbruos. Tero fariĝos giganta fajroglobo en la kosmo. Pereigis ĉio, kio heroldis pri la tera, homa kulturo.

Ne estos plu egiptaj piramidoj, ne serĉo la dramojn de Homero en Grekio, ĉio falos en nigran abismon. Vane estos la vekriego! Terure, la homa civilizacio malaperos.

Eble post jarmilionoj naskiĝos nova Tero kaj ĉio komenciĝos denove.

Estos bestoj, planoj kaj espereble naskiĝos ankaŭ inteligenta homo.

Ĉu tiu homo estos pli bona, ol la nuna? Tion neniu scias.

Sed eble ĉi planedo estos nur senhoma dezerto.

Certe jam dum la historio de la terглоbo kelkfoje estis simila mondo, kaj ĉiufoje ĝi renaskiĝis.

Ankaŭ tiam estis maljunulo kiu estis fiera pri siaj pomoj kaj de la frua printempo tra la varmegaj monatoj atendis zorgoplene la pomorikolton.

Li staris senmove en la fruktoĝardeno kaj li rigardis la pomarbojn, kiuj staris vice. La ok pomarboj estis la diamanto de la ĝardeno. Tie ankoraŭ estis diversaj legomoj, sed ilin prizorgis lia edzino. Lia tasko estis la pomarboj.

Jam en la fino de februaro li laboris ĉe la arboj. Li purigis ilin de la vintraj malpuraĵoj, poste li tondis la branĉojn kaj zorge li priŝprucigis ilin kontraŭ la vermoj kaj aliaj insektoj.

Apenaŭ li atendis la rikolton. Jam en aŭgusto li gustumadis la pomojn, ĉu ĝi estas sufiĉe dolĉa, suka aŭ manĝebla.

La somera sekeco tre malgajigis lin, kvankam li akvumis la arbojn dum la tuta somero. Tamen la

akvo, kiu fluas el la tubo ne estas tiom bona, ol la pluvakvo.

La pomoj restis etaj. Pasintjare ili estis duoble, eĉ trioble pli grandaj.

Kiel vendi tiajn ĉi pometojn en la foiro?

Antaŭ nelonge surstrate oni haltigis lin.

— Oĉjo, ĉu ankaŭ ĉi aŭtune vi vendos pomon? — oni demandis lin.

— Eble, sed mi ne scias, kia estos la rikolto.

Alvenis la pomorikolto. Li kun sia edzino komencis la laboron.



Ili ekiris al la pomarboj kun grandaj korboj. Ili ambaŭ estis malgajaj.

Ĉi aŭtune la korboj ne ridetis tiel, kiel en la antaŭaj jaroj. Tiutempe la pomoj konkurante unu kun la alia kriadis: „Ankaŭ min rikoltu! Ne lasu mi sur la branĉo!”

Sed nun en la ĝardeno estis profunda silento, kvazaŭ la pomoj plorintus amare, kiel ili ne povis kreski pli granda.

La maljunulo prenis la unuan pomon. Ĝi estis tre malgranda. Li ekĝemis kaj ĝin li metis monotone en la korbon.

Li ĵetis rigardon al sia edzino. Ankaŭ ŝi ne estis kontenta pro la nuna rikolto, sed ŝi konsolis la maljunulon:

— Ankaŭ la pomarboj devas ripozi. Ekvidu kara, venontjare ni denove rikoltos grandajn pomojn.

— Apáti Kovács Béla —



Poezio

"Wiktors Elski" (Stanislaw Zygmunt BRAUN, 1893-1956). Polo; oficisto. Verko: *Unuaj agordoj*. Poste liaj poemoj aperis en multaj esperantaj revuoj dum la periodo 1912-1920.

"Eska" (Stanislaw KAROLCZYK, 1890-?). Polo; oficisto. Esperantisto de 1907. Tre aktiva en la pola movado, aperigis poemojn en diversaj gazetoj. Verko: *Unuaj agordoj*. Multe tradukis el polaj verkistoj.

La libro *Unuaj agordoj* aperis en 1912 kiel n-ro 3 de la "Nova Esperanta Biblioteko" ĉe la Librejo Stanislaw Miszewski en Lodz, Pollando. Dankon al la arĥivejo de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, kiu disponigis al mi ekzempleron por kopio al la reto.

Iom pli pri "Wiktors Elski" kaj "Eska" kaj iliaj poemoj oni povas legi en la eseeto "Pluaj Agordoj" de William Auld. La eseeto unue aperis en la revuo *Norda Prismo* kaj estas lastatempe republikigita en la esearo de *Auldpaĵeroj kaj stoploj: elektitaj prozaĵoj*.

Al la amikoj de Wiktors Elski

Al agado, al laboro!
Kvankam ĉie malfavoro,
Kvankam homoj nin ne fidas,
Nek la celon nian vidas.

Al agado, al laboro
Kun kuraĝo en la koro!
Malgraŭ baroj sur la vojo,
Stel' espera nia ĝojo.

Jen ĝi lumas verda stelo,
Lumas hele sur ĉielo,
Ne permesas al ni plori,
Sed ordonas: plu labori!

Stelo lumas sur ĉielo,
Vojon montras ĝi al celo.
Nur persiste, nur konstante,
Pri la venko ne dubante.

Do ne dormu, sed leviĝu,
Koroj viaj ekflamiĝu
Kaj ekkriu per fervoro:
Fratoj, ĉiuj al laboro!

Tagiĝe de Eska

Jam disiĝas nokt' malluma,
Similante al rubeno
Jen leviĝas sunmateno
En purpuro, en oruma.
Suno, hela suno, Vi,
Kiam brilos Vi por mi?
Reviviga roso brilas
Sur folioj de lariko;
Nur ploranta la saliko
Ĉiujn arbojn ne similas.
Kiam brilos Vi por mi,
Suno, hela suno, Vi?

Eble iam... de Eska

En la tombo, ebla iam
La feliĉon mi retrovos,
En la tombo mi nur povos
Por etern' ekdormi tiam...

Per feliĉo vent' ekblovos
Kaj ĝi gaje bruos ĉiam,
Se sopiro min neniam
Persekuti, ho, ekprovos.

Kvankam mondo estas bela,
Homoj vivas per espero,

Sed posttombo viv' plihela
Ol ĉi-tiu mond'-infero...

Mia vivo ja sencela,
Do min kovru tuj la tero!



Por infanoj



Petro kaj Jana trovas novajn amikojn

Somero plilongiĝis. La vetero estis bela, ĉar matenoj estis mildaj, tagomezo tre Varma, sed posttagmeze kaj vespere oni povas senti ian varmofreŝan ondon kaj kiel nokto profundiĝas tiel aero fariĝas pli kaj pli freŝa. Tiun prokrastitan someron oni alnomis Miholĵa somero. Do, laŭmonate estas oktobro en sia unua duono.

Sur verda herbejo Sara sidis jam longe. Ŝiaj manoj estis sub ŝia kapo anstataŭigante kusenon. Ŝia longa jupo estis malpuroverda pli malhela ol helverda. Ŝiaj someraj botetoj estis nigraj enplektitaj per ŝnuroj. La blanka bluzo estis kovrita per mielkolora jako. Sara estis juna fraŭlino kies bluaj okuloj rigardas malgaje. Venteto milde karesis ŝian helbrunan hararon.

– Mi ne scias kiel okazis ke mi solas – ekpensis ŝi kaj laŭte diris. – Vidu mia ora fiŝeto, vi estas mia maskoto, ĉio restinta de mia fora amikino, Dominik. Mi ne eltenos plu tiun solecon. La grandaj bluaj okuloj pleniĝis de larmoj. – Se mi havus novajn amikojn kun kiuj mi ludos kaj pri kiuj mi zorgos.

Subite la fiŝeto eksaltis el ŝiaj manoj kaj ŝi povis aŭdi kiel ĝi proponas al ŝi ĉi tion – Kara Sara, ne estu malgaja. Mi ne estas simpla ora fiŝeto. Mi vere estas ora fiŝeto kaj via deziro al mi estu ordono. Diru vian deziron laute. Nur estu atenta, ĉar mi plenumigos nur unu deziron!

Unue, povra Sara ne povis kredi, ke tiu fiŝeto parolas kun ŝi! Ĉu ŝi ne estis tro longe sur suno? – Ho ne, mi sonĝas! Ŝi fingre pikis vangojn, eltiris orelojn, sed la fiŝeto estis tie alparolanta ŝin. – Ne timu Sara, diru vian deziron laŭte!

Dirite, farite.

Sara mire staris meze de la valo apud kiu troviĝis lazura lageto. Malantaŭ ŝi troviĝis ligna domo ĉirkaŭata de fruktoĝardeno. Bonodoroj de la fruktoj piroj, prunoj kaj cidonioj rapide konvinkis ŝin, ke ĉio estas reala. Rapide ŝi rekonsciĝis.

La ora fiŝeto saltetis gaje el kaj en la lagon. Sara sentis, ke ŝi komencis ŝviti. – Mi apenaŭ kredas Vi ne estas falsa ora fiŝeto! - diris ŝi ridante.

Subite ŝia rigardo direktiĝis al la mallarĝa vojo sur kiu gaje paŝadis tri ursoj. Sur la ŝultro de la plej forta kaj alta urso staris blua papago. Ĝia kolo estas kolorita kiel ĉielarko kun granda ruĝa silka maŝo. La unua plej alta kaj maljuna urso estis vestita kvazaŭ li estus iu estro altranga.

La dua urso estis pli juna, kaj li kaj la tria urseto aspektis kiel ili kune fuĝis el iu cirko. Eĉ ili aspektis amuze. Eble tian aspekton donis al ili la grandaj okulvitroj portantaj de la urseto dum la dua urso havis kostumon kvazaŭ li estus laboranta en cirko.

– Miaj piedoj rifuzis min plu porti. Ni devas sidiĝi kaj bone ripozi. – grumblis la plej maljuna urso. La plej juna urseto nenion diris, nur lace falis sur la genuojn.

Sara scivole rigardis ilin. Ŝia koro forte batis – Ja...jen novaj amikoj! – Mi estus feliĉa, se vi akceptos min kiel via amikino – diris ŝi unuvoĉe etendiĝante la manojn al la plej maljuna urso.

Bonvenon en mia nova domo. Eniru ni dometon kaj poste vi ripozu iomete – diris Sara pli serioze ol ŝi aspektis.

Sed la dua aŭ meza Urso staris kvazaŭ liaj piedoj enradikiĝus. Lia kostumo blukolorita kun flava silka maŝo bele ornamis lian brunan felon. Sara maltrankvile iris tien alien.

Tiam ĉiuj turniĝis al la maljuna Urso. La papago ekflugis de sur lia ŝultro surteriĝante la malnovan mezgrandan puton troviĝanta dekstre de la ligna domo.

– Jen, ni havas puton, ni havas akvon! Hura ni ne estos soifaj plu! Ni havas lageton kaj tre belan fruktoĝardenon. Piroj estas viaj fruktoj favorataj, ĉu ne? - demandis papago la ursojn.

– Jes, vi pravas – respondis la maljuna urso. Nia kara fraŭlino estu nia dommastrino kaj mi prizorgos pri miaj ursetoj eĉ pri vi babilaĉa papago.

Ili ĉiuj rapide konsentis pri tio, kaj pli rapide interkonsentis kion ili faru plue.

–Ĉi tie estas frua aŭtuno – diris Sara kun zorgema vizaĝmieno daurigante :

– do, ni rikoltu fruktojn, morgaŭ matene, kaj nepre ni apartigu iom da fruktoj por vintroprovizo. Jes, ĉirkaŭ lageto estas sabla grundo. Ni devas kolekti la pirojn kaj cidoniojn, kaj profunde ensablighi ilin ..

La tria urseto estis malgaja pro malsato. – Kion ni manĝos nun? - ĝi demandis ilin tre atente.

– Mi ne scias – respondis la fraŭlino Sara.

– Eble estas io en la domo. Eniru ni, kaj ni vidos, ĉu estas io preparita por ni.

En la domo, en kuirejo troviĝas la granda tablo. Surtabligita estas manĝo, en la granda ujo vaporiĝis bongusta supo kies odoro tre logis kaj okulojn kaj buŝon. En eta ujo troviĝis manĝo por birdoj kaj meze de la tablo troviĝis ujo kun mielo por ursoj. La kuirejo estis riĉe ekipita.

Tial ĉiuj estis kontentaj kaj kviete sidiĝis ĉe la tablo por manĝi. Tiam aŭdiĝis bela sed tro laŭta

melodio. Momente ekiĝis silento, post kiam ĉiuj brue stariĝis elkurante eksteren.

Je ilia surprizo du junuloj kuregis etendiĝante manojn al ili. Tiuj estis Jana kaj Petro. Ilin akompanis papilioj, kato, hundo kaj bruantaj pasaĝeroj.

– Jen, kiu uzis nian someran dometon – diris unuvoĉe Jana kaj Petro.

– Bonvenon al nia bela komuna domo! Ni ne plu estu solaj!

Ekestis gaja bruado kaj ridoj sur ĉies lipoj. Sekvis interkona vespero.

Se vi ne kredis, iru tien por konvinkiĝi!

Kaj poste ni vidis.

Ni sekvis aventurojn de niaj malnovaj amikoj Jana kaj Petro kaj nova amikino Sara kun ŝiaj tri amikoj ursoj, kaj belega blua papago.

Estos daŭrigota.

Verkis Miric Jadranka Zajeĉar– Serbio /Oktobro 2019

